



# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 37<sup>an</sup> jaron



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k137/k137.html>

*La tago de Esperanto! Ne miskonata, sed diskonata.*



# JULIO

Semana 30

Ducentésimo séptimo día del 2025  
Quedan 158 días para finalizar el año.  
Sol 07:07 a 21:35 - Luna 08:42 a 22:51  
14h 28m 45s - Media creciente 4%

<https://t.me/boost/calendariidario>

# 2025



Quien no sabe de abuelo, no sabe de bueno.  
(frán)

# Sábado

Santos: Joaquín y Ana padre de la virgen María;  
Erasto, Valente, obispo Sinfonio, Teódulo,  
Exuperia, Ciriaca, Demetrio, Eusebia, Jacinto,  
mártires; Pastor, presbítero; Simeón, monje;  
Benigno, Caro, Cristóbal, Bartolomea y Vicenta  
Capitania, confesores; Godón, abad.

# ¡Buenos Días!

**Día Internacional de conservación  
del Ecosistema de Manglares**  
**Día Internacional del Esperanto**  
Día de los abuelos

# Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE).

## el la Sudo

Sociala adreso: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

ISSN 1886-1938 (printita)

ISSN 1886-1997

Depósito legal: Z-2398-88

# Enhavo

**Redaktore:** De lingvo al paco.....3

**Politiko:** Ĉu Israelo aŭ Palestino?...4

**Filozofio:** Kiu estas mi?.....7

**Beletro:**

### **Sireno de Serenin':**

7 Surtera ekskurso.....9

8 Reunuiĝo.....11

9 Epilogo.....16

### **Defendo de Hispaneco:**

Sistemo de limigita partenereco..18

Sukceso de vilaĝanoj.....20

**Kovrilo:** Ĉu vi, leganto, sciis, ke la 26<sup>a</sup> de julio estas la Tago Internacia de la Lingvo Internacia, tio estas, Esperanto? Jes, la 26<sup>an</sup> de julio de 1887 Ludoviko L. Zamenhof sukcesis publikigi la unuan gramatikon de Esperanto en la rusa lingvo, titolita *Unua Libro*, sub la pseŭdonomo de Doktoro Esperanto. De tiam la libro estis *La libro de Esperanto*, kaj nekonatuloj kredis baldaŭ, ke Esperanto estas la lingvo per ĝi priskribita, kaj ne la nomo de la aŭtoro.

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa .**

**Pagmaniero:** aliĝo al HALE kontraŭ €10 rajtigas ricevi nian surpaperan version. Se vi deziras kontribui per aliĝo, kontaktu la redaktoron:

[kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

**Celo de ĉi tiu publikaĵo estas defendi kaj ekzerci liberecon pri penso kaj esprimo.**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj: **Scribus, Bluefish, LibreOffice, Gimp, kaj Yafc.**

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.



## Redaktor De Internacia lingvo al paco tutmonda

**E**speranto estas lingvo ne rekte konata dise tra la mondo. Kiam oni mencias ĝin, oni kutime aŭdas, ke *Tio estis bona ideo, sed ĝi ne sukcesis, pro la franca kaj poste la angla, kiuj estas veraj internaciaj lingvoj.*

Kaj ververe, de la tempo de Napoleono, la francan oni altrudis tra Eŭropo kiel la lingvon de diplomatio kaj kulturo, kaj ekde la duono de la 20<sup>a</sup> jarcento tiun rolon adoptis la angla. Sed kial?

Homoj kutimas paroli la potenculojn, per ties lingvo. Pro tio la angla popolo lernis la francan por paroli la Plantaĝenetajn reĝojn kaj ties nobelulojn, de kiam ili invadis Anglujon je la 11<sup>a</sup> jarcento, post la Batalo de Hastings. La francoj invadis tutan Eŭropon de Portugalio al Rusio, krom la Unuiĝintan Reĝlandon, kaj eĉ se oni venkis la francojn finfine, ili lasis siajn lingvon kaj kulturon tra la tuta kontinento kiel plej avangardajn kaj kultajn.

Tamen, post 1945<sup>a</sup>, estis Usono tiu, kiu venkis tutan mondan militon, la Duan. De tie venas la prestiĝo de la angla lingvo. Kaj de tiu tempo oni lernas ĝin, ĉar ĉiu lando altrudis ĝin en siajn edukajn programojn. Sed tion

faris registaroj, ne homoj.

Homoj plejŝatas kaj plejutilas uzon de sia propraj lingvoj. Kaj Esperanto estas plej oportuna ilo por interkompreniĝo ĝuste ĉar ĝi originas el neniu popolo, sed el inteligenta homo, kiu devizis ĝin por ke ĝi estu facile lernebla kaj uzebla, kaj por uzi hejme, oni preferinde uzu sian propran lingvon.

Bedaŭrinde oni vivas en mondo, kie oni emas perforti sian propran kulturon al aliaj. Ne nur Usono faras tion. Fakte islamanoj faras tion nun, same kiel eŭropanoj (krom hispanoj) faris en siaj kolonioj en istempoj. Sed nun oni vidas la tragedion de Gaza-o, kie milito raĝas. Sed oni ne mensogiĝu: ne nur estas milito en Israelo kaj Ukrainio: ekzistas aliaj 54 militoj en la mondo nun. Kelkaj el ili tre longdaŭraj, kiel tiu en Kongo, kiu estas jam 30jaraĝa.

Kaj oni ne povas ne demandi sin: kiu estas la solvo? Ĉu UNO utilas al io ajn? Nun Prezidentoj de Hispanio kaj Usono deziras elektiĝi por la Nobela Premio pri Paco, ĉar ĉiu ili apogas unu diversan flankon de israelpalestina milito. Tiu premio devas esti por tiu, kiu sukcesos halti militon, ne kuraĝigi ĝin.



Politiko

## Ĉu Israelo aŭ Palestino?

**M**altrankviliĝas hispanoj nune pri la palestina problemo. Ĉie, kien mi rigardas, mi vidas homojn svingantajn la flagojn de tiu supozebla ŝtato — nuntempe ŝajnas, kvazaŭ ĝi nur estas ribela aŭtonoma regiono de Israelo — kriegantajn arde, senagnoskante rajton respondi al tiuj, kiuj pensas alimaniere (kvazaŭ ili estas tute pravaj, kaj ĉiu argumento kontraŭ tiuj siaj estas **faŝisma, mensogiga** aŭ **vundiga**), kontraŭ la supozebla genocido de la israela popolo kontraŭ palestina aŭtonoma regiono.

Parafrazante la klasikaĵon, mi nek venigas nek forigas reĝon, sed mi defendas mian ordinaran prudenton: estis **palestinanoj** tiuj, kiuj **kidnapis** — antaŭ ĉirkaŭ du jaroj — kaj **murdis** la partoprenantojn de **festo por paco** okazinta en Israelo proksime al la limo kun Gazao. Hamas-gerilanoj rompis la pikdraton kaj paraŝutis tien, kaj la festantojn, kiujn ili ne mortigis, ili forprenis per forto, el kiuj kelkaj poste

mortis pro mistraktado aŭ **tor-turo**. Ŝajnas, ke **neniu memoras tion**. Kaj ŝajnas, ke tio estas bagatela kompare kun la terura



hebrea malestimindeco murdi kaj malsatigi infanojn, kaj mi supozas, ke ankaŭ plenkreskulojn. Nu, nun ĉiuj judoj fariĝis pli-malpli sekvantoj de Herodo.


Sed inter la bildoj, kiujn niaj novaĵelsendoj servas al ni, iom partiane, estas aferoj, kiuj kaptas mian atenton:

1. Estas **subteraj tuneloj** kaj konektaj **galerioj**, kiujn teroristaj gerilanoj de Hamas konstruis sub la urbo, kaj tie ili rifuĝas kaj konservas siajn misilojn kaj armilojn. Sed ŝajnas, ke gazaaj infanoj kaj siaj patriroj kaj geavoj ne rajtas esti tie. Teroristoj rezervas ilin kiel la *akceptan komitaton* por la hebreaj misiloj, por ke ili poste povu aperi en la novaĵoj kiel *viktimoj de la teruraj bombadoj kontraŭ la civila loĝantaro*.

2. La **misiloj**, kiujn teroristoj ĵetas al judoj, kiuj pace sidas en siaj hejmoj, estas lanĉitaj el la proksimeco — se ne el ties keloj — de hoteloj, lernejoj kaj hospitaloj. Tio kaŭzas, ke judaj misiloj sekvas la **varmospuron** de la atakantaj misiloj kaj eksplodas en siaj devenlokoj, ĉar al palestinanoj mankas la sofistikaĵoj laseraj spuraj kaj kontraŭmisilaj armiloj, kiujn posedas la judoj, ŝajne mondekskluzive, ĉar eĉ la jankioj ne posedas tiajn aparatojn.
3. Dum la tempo de **Prezidinto Klinton**, al la palestinanoj **oni proponis** — jes, memoru, la Interkonsentojn de Camp David, en Usono — **ŝtaton apartan** de Israelo, kun ĉi-lastalando konsentanta, kondiĉe ke ili ĉesigos malamikecojn por ĉiam. Sed la palestinanoj rifuzis subskribi.
4. En Israelo, estas **du milionoj da palestinanoj** — ekster la Gaza-strio kaj Cisjordanio, tio estas, en la israel-kontrolataj areoj — laborantaj kaj gajnantaj eŭropajn salajrojn, ne la mizeron, kiun ili ricevas en Egiptujo aŭ Jordanio, por nomi nur du islamajn landojn. Ĉi tiuj palestinanoj ne apartenas al Hamas kaj kondamnas teroristajn agojn, sed nia registaro ne diras al ni pri tio.
5. Romia Imperiestro **Hadriano** renomis la Provincon de Judujo kiel Palestinon en la **dua jarcento p.K.** por humiligi la judojn. Antaŭ tiu tempo, **Palestino ne ekzistis**.
6. **Antaŭ** ol la judoj alvenis en Israelon en 1948, tie ne estis palestinanoj, sed **britoj**. Antaŭ la britoj, ne estis palestinanoj, sed **otomanoj**; antaŭ la otomanoj, **bizancanoj**, ne palestinanoj; antaŭ la bizancanoj, **romianoj**, ne palestinanoj; kaj antaŭ la romianoj, **judoj**, ne palestinanoj.
7. Kiam la judoj alvenis tien, antaŭ kvin mil jaroj, ekzistis aliaj popoloj, sed ili ne atingis nin, kaj ili neniel estas la prapatroj de la hodiaŭaj palestinanoj.
8. Islamanoj ne ekzistis ĝis la 7-a jarcento, post la Heĝiro de Mohamedo je 622<sup>a</sup>, kaj tio, kio diferencigas la hodiaŭajn palestinanojn de la judoj, ne estas genetiko, sed religio.
- Pro ĉiuj supre menciitaj kialoj, **palestinanoj**, laŭ mia opinio, **ne povas postuli proprion de la tero**, kaj tial estas neeble, ke la judoj ŝtelis ĝin de ili. Ĉi tiu povas pensi nur tiu, kiu ne scias historion kaj estas vole aŭ nevole viktimo de la demagogio vomata de niaj amaskomunikiloj.
- Fine, mi ŝatus aldoni, ke la batalantaj flankoj en ĉi tiu milito ne estas palestinanoj kontraŭ israelanoj aŭ inverse, sed Israelo kontraŭ terorista grupo nomata Hamas, kiu prifajfas la loĝantojn de Palestino kaj uzas ilin kiel homajn ŝildojn kaj mili-

tan armilon por propagando. Hamas deziras teokratian ŝtaton tra tuta Israelo, kiu estas demokratia ŝtato, kiel videblas el lastatempa novaĵraporto: Prezidanto Netanjahu alfrontas du jurajn procesojn pro supozata korupto ene de sia partio. Lando, en kiu eĉ ĝia prezidanto devas respondi al la leĝo, estas multe pli demokratia lando ol tiu nia, kiun multaj konsideras demokratia. Tamen, en neniu islama lando ĉi tiu situacio po-

vas validi: la prezidanto ne povas esti procesata laŭ iu ajn leĝo krom tiuj preskribitaj de sia religio, kaj murdo aŭ atenco fare de islamano estas krimoj, kiuj ne nur ne estas puninda, sed antaŭenigataj, kiel ni ĉiuj scias pro la kazo de Salman Rushdie, aŭtoro de la libro *Satanaj Versoj*, kiu tiom ĉagrenis islamajn gvidantojn, ke ili promesas paradizon plenan de hurioj al tiu ajn, kiu sukcesos mortigi lin.



Post la amasbuĉado je la 7<sup>a</sup> de oktobro de 2023<sup>a</sup> jaro.

Pli ol 400 homojn mortigis teroristoj en la Festo por Paco, kaj prenis 50 ostaĝojn. Nun oni konsideras, ke 60 000 palestinanoj perdis sian vivon pro la bombado israela pro tio, ke teroristoj ne liberigas la ostaĝojn ĉu vivaj ĉu mortintaj, ĉar al Israelo gravas ĉiaj homoj.



Gaza hospitalo detruita de israela bombado.

## Kiu estas mi?

**D**um jarcentoj, filozofoj provis respondi ĉi tiun demandon. Kelkaj, kiel Descartes, resumas la problemon per ŝanĝo de la demando: *Mi pensas, tial mi estas (Cogito, ergo sum)*, sed li trompas nin, ĉar tio reduktas ekziston al farado. Homoj konscias pri si mem, pri sia ekzisto, jam dum jarmiloj, eble dekoj da jarmiloj.

Hundo aŭ bovino ne konscias pri si mem. Ili estas movataj de sensoj, emocioj, eble sentoj, sed ili ne konscias pri si mem, ĉar se jes, ili ne kondukas al ni kiel ili kondukas, fidelaj ĝis la morto, ĉar ni estas iliaj plej malbonaj predantoj, kaj ilia amikeco kun ni ne garantias al ili bonan traktadon, ĉar ni ekspluatas la virtojn de la unuaj kaj la karnon de la duaj. La plej granda predanto sur la planedo havas malmultajn skrupulojn kiam temas pri ekspluato al aliaj specioj kaj eĉ la bolido sidera, kiu ŝirmas homaron kaj ĉiujn aliajn speciojn, al kiuj ĝi provizas ĉion, kion ili bezonas por ties vivtenado..., kio favoras al tiu sia, ankaŭ.

La Tero, tial, ŝajnas ankaŭ ne esti memkonscia, ĉar alie, ĝi jam estus seniginta de ni..., krom se

ĝi estas tiel inteligenta, ke ĝi zorgas pri ni, por ke ni faru favorojn, kiujn ni eble ankoraŭ ne komprenas klare, sed kiujn ĝi eble postulos de ni en la estonteco, ĉar ĝia supervivo kaj tiu nia estas interplektitaj.

Sed ĉu nia sidera loĝejo estas memkonscia aŭ ne, ne estas dubo, ke la homo estas memkonscia. Multaj pensuloj esprimis tion diversmaniere: Thoreau en sia *Walden*, Emerson en sia *Memfido*, Descartes en sia *Ergo*, aŭ María Zambrano en sia *Homo kaj la Dioj*, por doni nur kelkajn ekzemplojn. Ni scias, ke ni ekzistas, ni scias, ke ni iam mortos, kaj ni scias, ĉu estas io post la morto ĉu ne, ĉu kiam nia korpo paneos kaj fariĝos nura inerta maso, nia konscio daŭre ekzistos ĉu ne. Kaj ĉi tiu dubo naskis sennombrajn religiojn kaj ties ĉielajn kortumojn, kies ekziston neniu decide pruvis.

Aŭ ĉu ili ja pruvis?

Ekzistas multaj atestoj de homoj, kiuj asertas estinti ĉe *la alia flanko*, kiuj spertis tion, kio nomiĝas **PMS-oj (Preskaŭ-Mortintaj Spertoj)**, tiel proksimaj, ke ili foje transiris aŭ estis proksimaj al ĝi, kaj revenis, kvankam ĝis nun ili ne donis al ni solidan pruvon, kiel ekzemple diri al ni, kiu mortigis ilin, aŭ iun ajn alian

informon, kiun nur iu, kiu jam estis tie, povus scii.

Kion ni ja scias, estas, ke kiam ni vidas amikon, kiu mortis, kiam ni vidas, kio restas de ili, ni scias, ke tio ne estas nia amiko. Ke al ili mankas io, kion ili iam havis kaj jam ne havas. Ĉu tio estas ilia konscio? Ilia animo, ilia atmano, aŭ kiel ajn ni volas nomi ĝin? Multaj libroj estas skribitaj pri tio, mi mem skribis kelkajn\*, sed ni ne scias ion certan. Estas vere, ke saĝo —komprenata kiel lernado de aferoj kaj faktoj— estas supertaksita. Kio estus pli utila, laŭ mia opinio, estas kompreno. Kiam ni komprenos la universon, eble ni komprenos la vivon. Kaj tio signifas kompreni nin mem. Scii tion, kio ni estas. Kaj

poste tion, kiuj ni estas. Ĉar nuntempe ni ne scias, kio ni estas, kvankam ni ja scias, ke ni estas. Kaj tio devus sufiĉi por nun. Oni diras, ke kiam ni sukcesas esti sen pensi pri io ajn, ni resonas kun la Universo. Eble ne kun la Universo, sed kun io aŭ iu alia. Sed ni scios tion nur per multe da meditado, kaj atingante nirvanon, se tio eblas.

Dume, mi deziras, ke vi estu konscia, tre konscia. Kaj se vi iam komprenos, kio estas konscio, bonvolu diri al mi.

Konsciajn salutojn sendas al vi estaĵo, kiu ankoraŭ serĉas konscion.

\**La libro de kronikoj anĝelaj kaj anekdotoj demonaj*, <http://www.obracompleta.com/eo/kronikoj.html>, kaj *Estu tiel*, <http://www.obracompleta.com/eo/tielestu.html>, ambaŭ senpage legeblaj ĉe tiuj retadresoj.



## Beletre

## Sireno de Serenin'

## 7 Surtera ekskurso.

**T**uj konstatinte pri la kapabloj de mia dorlot –besto pri ĉasado kaj manĝado, mi venis al li, trovante lian saluton kaj rideton.

Kune ni sekvis la boaton kaj ni denove grimpis sur ĝian kilon. Kiam ĝi albordiĝis, ni iris al la fundo, nur dek metrojn sub la surfaco. Kiam ne plu estis bruo de la boato, liik grimpis surŝipen. Li rompis la seruron kaj eniris.

~Mi vidas, ke vi lernis la bazajn lecionojn de supervivo.

~Ho, jes, Serena. Envenu, estas vestaĵoj ankaŭ por vi ĉi tie, li diris kun evidenta sarkasmo.

Li surmetis la vestaĵojn de la boatposedanto. Subite, li rigardis min surprizite:

~Al vi kreskis kruroj! Kie estas via vosto?

~Mi eniris la boaton antaŭ minutoj. Kiam ni sireninoj sekiĝas, niaj vosto transformiĝas en krurojn.

~Ha, bone scii. Tiam vi povas porti la vestaĵojn de la blondulino.

Fakte, la vestaĵoj de la virino pli bone konvenis al mi ol tiuj de

la viro al li, kiuj estis iom larĝaj. Ni eliris el la boato kaj direktiĝis al la urbo.

Ĝi estis malgranda urbo, kun sia placo, sia ĉefstrato, sia preĝejo kaj sia urbodomo. Kaj ĉefe, sia drinkejo, kiu estas la plej grava loko, ĉar tie homoj kunvenas; la viroj, fakte, dum la virinoj restas hejme por zorgi pri la infanoj.

~Ĉu vi povas memori homan paroladon?

«Mi provos», li diris, parolante.

«Estas malfacile por vi».

~Estas lacige. Estas pli rapide, pli utile, kaj pli facile paroli per via menso.

«Vere. Sed ĉi tiuj homoj bezonas solidan subtenon por kompreni unu la alian».

~Kie ni estas?

Mi vidis ŝildon sur la strato. Mi rekonis la lingvon: la islandan.

~En Islando.

~Malbonŝanco: Mi ne scias la islandan.

~Mi ankaŭ ne, sed ni sukcesos.

Mi eniris la drinkejon, kaj ĉiuj turnis sin por rigardi min. Ne estis normale por virino eniri

tien.

«La necesejon, mi petas?», mi demandis.

La trinkejisto kapmontris al mi. Mi rigardis de la pordo.

~Parolu vian lingvon, sed sendu la telepatian mesaĝon forte. Tiam ili komprenos, kondiĉe ke vi legos ilian respondon en ilia menso se vi forte klopodos.

Li envenis kiam mi iris al la banĉambro.

«Bieron», li demandis hispane dum ili aŭdis ĝin en siaj mensoj islande.

La trinkejisto metis ĝin antaŭ lin, kaj li pagis per kelkaj moneroj, kiujn li trovis en sia sportvesta poŝo.

Li sidiĝis ĉe libera tablo apud fenestro, kaj kiam mi forlasis la banĉambron, mi sidiĝis apud li.

~Ni vidas, ke vi jam regas ambaŭ mondojn, sireno.

~Ĉu mi estas?

~Kompreneble ~Mi diris al li mense, dum ni ŝajnis rigardi la pejzaĝon el la fenestro. ~Vi jam manĝis vespermanĝon. Vi kontaktis ĉi tiujn homojn, kaj vi ne havos problemon iri vidi vian familion.

~Mian familion..., mia familio... Kiom longe mi forestis?

~Longtempe.

~Dek jarojn?

~Pli.

~Pli? Kiom multe?

~Mi ne scias. Sed vi devos mem ekscii tion.

~Ha, mi bezonos longe por atingi Hispanion ekde Islando...

~Nu, vi scias kiel vojaĝi per ŝipo. Post tri tagoj vi atingos Norvegon. Post plia tago kaj duono vi atingos Anglion, kaj post pliaj 30 horoj vi atingos Hispanion.

~Tio estas semajno.

~Se vi ne devas atendi la konekton, jes.

Alfrontite al mia silento, mi lasis lin pensi private.

~Bone, karulo, mi foriras. Kiam vi solvos viajn familiajn problemojn, vi jam scias kie trovi min.

~Ĉu ĉe via kaverno, en Kipro?

~Ĝuste.

Mi leviĝis kaj direktiĝis al la pordo. Unu el tiuj islandaj junuloj, tre dikaj, eliris malantaŭe. Ŝajne li ŝatis min. Mi jam faris nur kelkajn paŝojn al la haveno kiam li alproksimiĝis al mi.

«Kien vi iras tiom rapide, belulino?»

Liaj intencoj estis evidentaj. Li

ĵetis sin al mi kaj mi pikis mian manon, ungegecan, en lian stomakon kaj malfermis ĝin. Mi daŭre puŝis supren kaj disŝiris ĝin. Mi elŝiris lian koron kaj manĝis ĝin per unu mordo. Mi faris same al liaj stomako kaj hepato.

Mi rigardis al la fenestro kaj vidis, ke Iiik vidis ĉion. Mi kapjesis kaj sendis al li klaran telepatian mesaĝon:

~Jes, Iiik, sireninoj ankaŭ manĝas homojn. Ni manĝas ĉion, kio moviĝas.

~Ĉu vi ankaŭ manĝas aliajn sireninojn?

~Ne. Nia genetiko ne permesas al ni homofagion. Kvankam ĉiovoraj, ni estas heterofagiaj. Ankaŭ, nia haŭto estas pli malmola ol tiuj de aliaj zoologiaj specoj. Ni ne povas digesti ĝin. Ŝarkoj ankaŭ ne povas.

Mi portis sur miajn ŝultrojn tion, kio restis de tiu stultulo, kaj kiam ni atingis la havenon, mi saltis en la akvon kun li, senvestigis lin, kaj festenis okaze de la diplomiĝon de mia dorlotbesto, la nova marviro. Ĉu li fariĝus sirenino en la estonteco? Malfacile diri. Mi ne lasis eĉ oston de tiu giganto. Ĝi ne gustumis tiel bone kiel mia plej ŝatata plado, la martelkapa ŝarko, sed ĝi ne estis malbona. Tiam mi svingis miajn koksojn kaj

moviĝis for, vosto milde batante la akvon. La luno preskaŭ tuŝis la horizonton, kaj mi amis ĝian vojbrilon, eĉ pli ol la sunan. Mi ofte pasigis horojn rigardante kaj la lunon kaj ĝian brilon, sed tiun nokton mi sentis min pli kiel moviĝi por digesti tiun islandan giganton, originalan, trinkitan per aŭtentika, glacie malmola marakvo. Post kelkaj semajnoj, mi alvenis al mia mediteranea kaverno kun neniu incidento menciinda. La maro fascinas min ekde mia naskiĝo, kaj mi sentas ĝin pli kaj pli kiel mia propra hejmo ĉiutage. Kvankam ĝi ŝajnas nekredeble, de Islando ĝis Kipro, pasante tra la Ĝibraltara Markolo, mi ne trovis iujn ajn el miaj kunspecaninoj, ĉar la mondo estas tiel vasta, kaj ni sireninoj estas la plej privilegiitaj el ĝiaj loĝantoj.

## 8 Reunuiĝo.

Jaroj pasis antaŭ ol mi revidis mian dorlotbeston. Hayk venis por akompani min dum kelke da tempo, kaj kune ni inspektis plurajn vrakojn, dronintajn ŝipojn, el kiuj ni elprenis aferojn, kiuj kaptis nian atenton, kiel ponardojn kaj monerojn, sed ni sciis, ke ili estas senutilaj por ni, ĉar akvo kaj tempo rustus ilin kaj senigus ilin.

~Oni jam diris al mi, ke vi manĝis ŝarkon en mia hejmo dum mi forestis, sirenino ~Mi diris al ŝi kiam mi revenis.

~Jes, ĝuste. Mi venis vidi vin kaj vidis unu el viaj dorlotbestoj. Tiu ŝarko enmetis sian nazon kie ĝi ne devas, kaj tial mi portis ĝin. Ĉar ĝi protestis kaj mi sentis min malsata dum du semajnoj, mi manĝis ĝin por vespermanĝo.

Hayk samaĝas min pli-malplie. Ni ekinterkonatiĝis dum nia unua jarcento, je nia infanaĝo. Tiam panjo ankoraŭ tre atente observis min, kaj ambaŭ niaj patrinoj amikiĝis.

Poste ni disiĝis, sed foje ni renkontiĝas hazarde, kaj alifoje ni vizitas unu la alian. Ŝiaj ĉasejoj estas ĉirkaŭ mil kilometrojn for de Nuadiki, kiu kaŝiĝas de la oceano malantaŭ duoninsulo, Ras Nuadiki, en Maŭritanio. Iafoje ŝi alproksimiĝas al la marbordo kaj miksiĝas kun la franca kolonio loĝanta en tiu lando, kiun ili nomas Port Étienne, kvazaŭ ĝi ankoraŭ apartenas al ili, la francoj.

Sed la maro ne havas limojn kaj ĝi estas nia natura elemento. Tiel estis dum miloj da jarmiloj, kaj tiel ĝi ĉiam estos.

Hayk akompanis min dum pluraj lunoj, kvankam kiam ŝi foriris, mi restis trankviligita.

Sireninoj kiel ŝi estas bona kompanio kaj ni riĉigas unu la alian, sed ni sentas nin multe pli bone kiam ni estas solaj, serĉante la profundojn de la majesta oceano, ĝuante akvofluojn, kiuj portas nin, mallaboreme, sur ian ajn vojon, kelkfoje al fiŝosvarmo kie ni povas kontentigi nian apetiton, aŭ alie ni greĝigas ilin, aŭ pasas tra ili silente neĝenantaj kaj neĝenataj.

Ŝarkoj kaj delfenoj alproksimiĝas aŭ foriras de ni depende de sia sperto. La unuaj scias, ke ni kelkfoje allogas fiŝkaptistojn per niaj krioj, kaj kiam ni jam satigis nian apetiton, resto estas por ili. Delfenoj estas pli ludemaj. Ili alproksimiĝas al ni kaj frotas siajn dorsojn kontraŭ niajn korpojn. Estas tre agrable, kelkfoje ekscite. Ili ludas kun ni, kaj ni iras kun ili supren al la surfaco.

Ni ofte ĝuas bonan ŝtormon. Homoj timas ilin ĉar se ili falas en la maron ili dronas kaj mortas, sed ni jam estas en la akvo, kaj ni ne dronas. Ni saltas de ondo al ondo, sekvataj de delfenoj. Iafoje ni luktas kontraŭ ili, kondukante ilin al marfundo, kaj poste liberigas ilin por ke ili povu supreniri por freŝa aero kaj ne morti, ĉar ili ne estas vere fiŝoj. Ili estas mamuloj kaj spiras freŝan aeron per pulmoj. Same kiel balenoj.

Kaj estis dum unu el tiuj ludoj, ke mi revidis lin. Iiik rajdis delfenon, kun unu kruro ĉe ĉiu flanko de la dorso de la besto. Li ne uzis bridon por gvidi ĝin, ĉar la mensa kontrolo, kiun li premis super sia improvizita transportilo, estis multe pli efika. Ni sireninoj nek uzas bridojn, nek rajdas delfenojn kvazaŭ ili estus ĉevaloj. Fakte, ni naĝas pli rapide ol ili.

Sekvante malnovan homan riton, li dedelfeniĝis kaj brakumis min. Mi lasis lin fari tion kaj eĉ kunlaboris en la brakumo ĝis li malstreĉis ĝin. Ni paŝis iomete malantaŭen por rigardi unu la alian, tenante manojn. Ni restis tiel dum kelkaj sekundoj, ĝis mi ne povis ne diri:

~Vi ŝanĝiĝis, Hiiiik.

~Sed vi estas ankoraŭ la sama kiel kiam vi kidnapis min, sirenino.

~Vi jam ne estas mia dorlotbesto.

~Ne, ne plu. Sed mi serĉis vin tra ĉiuj oceanoj de la mondo. Vi ne estis hejme.

~Vi scias kiaj ni sireninoj estas: ĉiam moviĝantaj. Ni vizitas unu la alian, ni esploras, ni malkovras..., mallonge, ni ĝuas la vivon, aŭ la maron, kio estas la sama afero.

~Jes, mi konas vian mondon, Serena. Kiu nun estas mia.

~Mi ĝojas scii tion.

~Sed..., esti ĉi tie sube ne permesas rigardi supren al la ĉielo kaj demandi vin, kio kuŝas pretere.

~Marviro, kiam ni atingas la surfacon kaj lasas nin luli de la ondoj, ni ja rigardas ĝin. La ĉielon kaj la maron. Kaj ni vidas la profundan ligon inter ili.

~Mi scias. Sed en viaj dudek jarmiloj, ĉu vi neniam scivolis, ĉu ekzistas aliaj civilizoj, aliaj inteligentoj?

~Ne nur mi scivolis, sed mi vidis ilin. Kaj ili ne lasis al mi bonajn memorojn, ne...

~Kio?

~Vi aŭdis min ĝuste. Laŭ tio, kion mia avino rakontis al mi, jarcentojn antaŭ mia naskiĝo, estaĵoj alvenis de supre. Ankoraŭ ne estis loĝantoj sur la kontinento, aŭ se ekzistis, ni ne konis ilin. ĉar ili ne venis al la maro. Tiuj, kiuj venis, estis tiuj strangaj estaĵoj. Ili estis sferaj kaj moviĝis per ruliĝado, sed ili preferis fari tion sur siaj veturiloj, kiuj floris egale en la aero super tero kaj maro. Ili ĝenis sireninojn, kaj mortigis kaj manĝis tiujn, kiujn ili povis kapti.

~Ĉu estis multaj?

~Estis pluraj miloj da ili, pli ol ni. Kiam mi naskiĝis, kelkaj el ili ankoraŭ restis. Ni nomis ilin la ronduloj.

- ~Ĉu restis iuj?
- ~Jes. Ni sireninoj malkovris ilian malfortecon kaj ekspluatis ĝin por venki en la milito. Ili estis tre fizike kaj mense aktivaj, kaj tial ili devis dormi plejparte de la tago, pli ol dek du horojn, foje multe pli.
- ~Kaj kion vi faris?
- ~Dum jaroj, ni eniris iliajn urbojn, kaŝis nin, kaj kiam ili dormis, ni mortigis ilin. Poste ni manĝis ilin. Nu, laŭ mia patrino. Poste ni ĵetis iliajn veturilojn kaj ilojn en la maron, kio fine igis ilin senutilaj.
- ~Ĉu vi iam kontaktis ilin?
- ~Mense. Sed ilia sola interkonsento estis ilia postulo, ke ni kapitulacu senkondiĉe, kaj ke ni estu tenataj sur ia bieno aŭ rezervejo por esti bredataj kaj poste manĝataj. Kiel homoj kun bovinoj.
- ~Do kio okazis?
- ~Nu, estis inverse. Ni mortigis preskaŭ ĉiujn el ili, kaj miaj prapatroj enŝlosis la postvivantojn sur bienoj, kie, sen ilia teknologio, ili estis nenio pli ol suplementa manĝaĵo por la sireninoj.
- ~Sed tio igus vin vivi sur la kontinento, ĉu ne?
- ~Ne nepre. Ili estis kiel suplemento al nia dieto, sed kiel ĉiuj suplementoj, ili ne estis necesaj. Sed tamen, ni manĝis ilin ĉiujn, kaj ne plu estas.
- ~Kaj ĉu ne plu venis de ilia planedo?
- ~Kelkajn jarojn poste, alia ekspedicio venis kaj kolektis la restintojn, la pranepojn de la venintoj, kaj forprenis ilin, kune kun iliaj restintaj aparatoj, kaj ili ne revenis ĉi tien. La rondecaj pluvivantoj ne povis diri la kaŭzon de la okazinta tragedio, kaj ili certe supozis, ke la planedo ne taŭgas por ke ilia specio loĝu.
- ~Ha, mi komprenas. Sed ĉu vi pretas por alia invado?
- ~La maro estas tiel vasta, ke ĝi protektas nin, liik, en sia grandega vasteco. Ĝi estas preskaŭ kvarcent milionoj da kvadrataj kilometroj, kaj ni estas malpli ol 9,000 individuoj. Trovi unu el ni estas sufiĉe malfacile, se ne neeble. Krome, nia voĉo aŭdeblas centojn da kilometroj for, kaj nia telepatio havas rekordon de kvin mil kilometroj, en ĉiuj direktoj. Se unu el ni estas en danĝero, ni ĉiuj scias tre baldaŭ, kaj la naturo de la danĝero atingas nin kristalklare, kaj ĉu helpo estus utila, aŭ ĉu estus pli malbone se multaj el ni kuniĝus por helpi tiun en danĝero. Jen nia strategio, liik: 382.549.248 kvadrataj kilometroj, dividitaj inter 8.342, tio estas preskaŭ 50.000 por ĉiu el ni. Estas malfacile trovi unu la alian se ni

- ne volas esti trovitaj, ĉu ne? Kaj ni povus organizi kontraŭatakon malproksime, ĉu surtere aŭ prefereble surmare...
- ~Mi komprenas. Sed ĉu ne venis pluaj eksterteruloj?
- ~Okazis aliaj invadoj, jes. Sed ili alklimatiĝas malbone, ili mortas, kaj tiuj, kiuj ne, foriras. Ĉi tiu planedo ŝajne toleras nur du dominajn speciojn: homojn —kiuj adaptiĝas al la medio laŭ suicidema maniero longtempe — kaj sireninojn, kiuj adaptiĝas tute al la medio, kaj tial ni daŭros multe pli longe.
- Li aŭskultis atente, silente, asimilante tion, kion li aŭdas.
- ~Sed diru al mi, ~Mi fine diris, ~Kiel iris kun via edzino?
- ~Ŝi preskaŭ ne rekonis min. Pasis preskaŭ 50 jaroj de kiam mi foriris. Laŭ tio, kion ili rakontis al ŝi, fluo portis min al la maro sen ke iu ajn povis haltigi ĝin. Estis boatoj serĉantaj min dum pluraj tagoj, ĝis ili rezignis. Ili raportis min malaperinta, kaj poste mortinta.
- ~Kaj via edzino?
- ~Ŝi ploris por mi dum pluraj jaroj. Poste ŝi reedziniĝis kaj havis du pliajn infanojn, kiuj forlasis ŝin post la morto de ŝia dua edzo.
- ~Kaj viaj infanoj?
- ~Ŝi scias nenion pri ili, ŝi ne scias kie ili estas, aŭ ĉu ili ankoraŭ vivas aŭ ne.
- ~Kaj kion vi faros?
- ~Ŝi ne akceptas, ke mi estas tiu, kiu mi diras, ke mi estas. Ŝi diras, ke kvindek jarojn poste mi ne povas aspekti same kiel mi aspektis kiam mi malaperis, kaj kvankam mi similas al la ideo, kiun ŝi havas pri mi, nenio ligas nin kaj mi devus lasi ŝin morti pace.
- ~Kaj vi foriris.
- ~Mi metis ŝin en flegejon kaj antaŭpagis al ili iujn ajn elspezojn, kiujn ŝi eble devos pagi dum la sekvaj 30 jaroj, per kelkaj oraj moneroj, kiujn mi trovis en proksima ŝiprompiĝo. Kaj jen mi estas, Serena, preta fari tion, kion ajn vi opinias plej bonan. Ĉu mi jam estas sirenino?
- ~Hehe. Vi estas la sola vira sireno, marviro, laŭ mia scio, kiu ekzistas en la tuta oceano. Mi vidas, ke vi konservas viajn virajn organojn, kaj tio igas min demandi, ĉu vi povus gravedigi subakve...
- ~Jes, mi scias, ke vi knabinoj nur faras ĝin surtere.
- ~Mi vidas, ke vi ne uzas delfenojn por kunludi..., vi uzas ilin por transportado.
- ~Jes, ĝuste. Mi pripensis ĝin en Islando. Neniu ŝipo foriros al Norvegio ĝis la sekva semajno, do mi trajnis delfenon, kaj ĉar ĝi elĉerpiĝis, mi saltis de

delfeno al delfeno, kiel kurieroj faris en mia lando en la malnovaj tempoj, ŝanĝante ĉevalojn de poŝto al poŝto ĉiam. Nu, mi ŝanĝis delfenojn kaj iris senhalte al via kaverno. Daŭris du semajnojn, sed vi ne estis tie.

~Hehe, mia vojaĝo daŭris pli longe, multe pli longe. Por ni, la tuta sala maro estas nia hejmo, do mi amuzis min laŭvoje, rigardante aferojn kaj fiŝojn. Ne rapidis alveni. Vi preterpasis min senrimarkate, ĉar oceano estas tiel larĝa. Nu, ĉu vi enuiĝis atendante min?

~Ne precize. Mi prenis du senideajn homojn surborden tuj post kiam ilia boato trafis rokon, kaj poste mi reiris por daŭre dormi en via kaverno. Ŝarko elŝovis sian vizaĝon tie, sed mi certe rigardis ĝin sireneske, ĉar ĝi tuj foriris tiel rapide kiel eble. Mi pensis trejni ŝarkon por transporti min pli rapide, sed poste mi pensis, ke delfenoj estas pli bonaj ĉevaloj, do mi serĉis vin sur la sep maroj ĝis mi trovis vin ĉi tie. Ŝajne, vi ne sopiris min...

~Nu, ni ne uzas delfenojn por transportado, ĉar ni naĝas pli rapide ol ili. La afero simple ne indas. Mi donos al vi kelkajn navigadajn lecionojn poste, kvankam memstare mi vidas, ke vi majstras la bazaĵojn. Mi

certas, ke vi neniam faris tian longan vojaĝon en via homa vivo...

~Ne, ne vere. De Islando ĝis Hispanio kaj de ĉi tie ĝis via kaverno, estis pluraj miloj da kilometroj...

~Ĉirkaŭ kvin mil... En arksekundoj de grado, tio estas ĉirkaŭ du mil sepcent el tio, kion vi nomas marmejloj.

~Tio estas multe. Jes, mi volonte akceptos tiujn lecionojn pri rapida sirena navigado, Serena.

## 9 Epilogo.

**L**a transformiĝo de Iiik surtere estis multe malpli drasta ol tiu nia. Liaj piedoj en la akvo transformiĝis en naĝilojn, sed li neniam perdis siajn kruojn aŭ siajn virajn atributojn, kvankam li lernis kaŝi ilin en sia korpo kiam li estis subakve. Tamen, kontraste, kiam li ekscitiĝis, li povis kreskigi sian gravedigan glandon preskaŭ metron longan ekster sia korpo. Tio sufiĉis por atingi la reproduktan sistemon de iu ajn sirenino sub la akvo, tra la malgranda horizontala fendo kiu restas ĉe la nivelo de nia ventro kiam niaj kruoj estas anstataŭigitaj per granda fiŝvosto en la akvo. Tial Iiik reprezentis salton an-

taŭen en la evoluo de nia specio. Post gravedigo de mi en nia likva elemento, mi naskis viran sirenon, kiel li, sed kun vosto kiel tiu mia, tamen kun retirebla peniso, kiel tiu lia. La famo disvastiĝis inter la aliaj sireninoj, kaj multaj vizitis lin por patriniĝi.

Iiik ne kaŝis sin, kaj la seksproporcio en nia specio fine kreskis al dek inoj por ĉiu masklo. Ni komencis naski en la akvo, poste alportante la idojn al la tero por ke iliaj pulmoj ne atrofiĝu kaj ili povu resti amfibiaj.

Tamen, Iiik ne povis havi sekson pli ol unufoje monate, same kiel ŝiaj viraj idoj. Viraj sirenoj ne plu estis provizoraj stato nia, ĉar eĉ se maloftaj, jam estis stabilaj virsirenoj kun kaŝitaj atributoj ĝis, post monato aŭ pli, ili estis pretaj por esti uzataj denove. Tial sekskuniĝo fariĝis ekskluzive por reproduktaj celoj, kaj ne kiel homoj, por kiuj la sekundara funkcio estas la primara kaj inverse. Tial ni faras ĝin nur kiam ni volas esti patrinoj, kaj tial ni devas zorgi kalkuli la daton kiam ni povas sukcesi.

~Kiom da infanoj vi havas, Iiik? ~Mi demandis unu tagon.

~Ho, mi taksas ĉirkaŭ 3 600, 60 el ili maskloj.

~He, vi estis kun ni dum 300 jaroj.

~Mi estis unu el vi ekde la tago, kiam vi trenis min je la piedoj al via regno, sirenino.

Iiik daŭre navigis niajn marojn, nun liberaj de la homaro, ĉar ĝi memmortigis sin en unu el siaj stultaj militoj. Nun li estas la deponanto de du mondoj, kaj mara kaj tera, kaj li rakontas al ni aferojn pri sia tempo kiel homo kaj siaj deziroj kaj motivoj tiam kaj nun, la mirinda mondo de la maro.

Sed foje li pensas pri tiu mondo, kiun li konis en la plej mallonga tempo de sia vivo, kaj larmo eskapas, forportita de la oceana fluo, ignorete, ĉar li ankoraŭ nutras sentojn por la homoj de sia frua juneco, siaj amikoj, sia edzino kaj siaj infanoj..., kiuj ankoraŭ ekzistas, ĉar ili restas en lia memoro.

~Venu, ne staru senmove, ~Mi diras al li kiam mi vidas lin rigardi en la malferman spacon, ~kaj ne pensu pri tiuj, kiuj foriris. Ili ankoraŭ loĝas en via koro, kompreneble, sed tiu, kiu estas ĉi tie kun vi, estas mi. Kaj ĉi tie estas via familio, via familio nun.

Kaj li ridetas, kapjesante. Kaj li naĝas paŭze, malrapide for, ludonte kun siaj infanoj, kun siaj amikoj, kun siaj sireninoj. Sed li ĉiam revenas al sia Serena.



**Daŭrigota...**

## Defendo de Hispaneco

*Ramiro de Maeztu*

### La Sistemo de Limigita Partnereco

**L**a perfekta harmonio de intereso kaj spirito inter la ĉefo kaj ties dungitoj, kiu karakterizas la sistemon de limigita partnereco de la hispana komerco en Ameriko kaj kiu estas la sekreto de ĝia sukceso, atingiĝas per la konfido, kiun ĉiu dungito havas, ke se li montras aktivecon kaj inteligentecon en sia laboro, venos tago, kiam li interesiĝos pri la entrepreno, kaj alia tago, kiam lia propra ĉefo helpos lin establi sin memstare, tiel ebligante al li leviĝi al pli alta socia klaso ol sia propra. Iu, kiu komencas balai vendejon je dek tri aŭ dek kvar jaroj, povas koncepti la esperon fariĝi kasisto antaŭ dudek, rajtigita laboristo antaŭ tridek, industria partnero antaŭ kvardek, kaj estro iom pli poste. Esence, ĝi estas nenio pli ol la apliko de la malnova gilda sistemo al komerco, kun ĝia hierarkio de metilernantoj, vojaĝantoj kaj majstroj, en kiu nur tiuj, kiuj produktis majstraĵon, atingis la superan dignon de sia arto,

sen kiu ili ne rajtis dungi aliajn aŭ teni ian ajn oficon en la gildo aŭ frateco de sia metio. Sed tiam la dignoj de la urbo malfermiĝis al ili. Se masonisto aŭ ĉarpentisto povis esti komisiita por konstrui abatejon aŭ katedralon, kaj eĉ fariĝi membro de la reĝa domanaro, kiel la majstrokonstruisto de la reĝo, tio estis ĉar la Mezepoko, kiu estis kristana epoko, fondis siajn instituciojn sur la bezono de la homo konservi sian esperon viva, virto kiu ankaŭ ne ekzistas sen la fundamento de fido kaj la kulmino de karitato, sed kiu estis nutrata de la konvinko, ke la pozicio de ĉiu laboristo pliboniĝus laŭ la plejboneco de liaj verkoj, kio klarigas, aliflanke, kial la konstruaĵoj de tiu periodo estis tiel mirindaj.

Fine, la principo, kiu pelas la hispanan komercon en Ameriko, estas la sama, kiu konsistigis la kvintesencon de nia Ora Epoko: la firma kredo je la ebleco de savo por ĉiuj homoj sur la tero. Temas pri provizo al ĉiu individuo de la ŝanco, kiu permesos al ili levi sian pozicion en la mondo. Tio ne signifas, ke ĉiuj devos profiti de ĝi, ĉar multaj

estas vokitaj kaj malmultaj estas elektitaj. Kio estas farata estas apliki la parabolon de Patro Diego Laínez ĉe la Koncilio de Trento al la situacio de la fundamento. Tiuj, kiuj aspiras venki en la turniro, ricevas belegan ĉevalon kaj bonegajn armilojn, ĉar la graco de Dio estas alirebla por ĉiuj, sed poste, ĉiu kandidato devas batali malespere por venko. Eĉ la oficisto, kiu aspiras gajni la fidon de sia dunganto, devas meti sian tutan koron en ĝin. Li devas esperi je la prospero de la entrepreno. Sed li havas la firman esperon plibonigi sian pozicion post sia longa penado, kaj la antaŭenpensanta hispano preferas celi valoran rekompencan, eĉ se li nur akiras ĝin post multaj jaroj, tiel oferante hodiaŭ por morgaŭ, anstataŭ labori en unu el tiuj grandaj eksterlandaj entreprenoj en Ameriko, kie li probable estos pli bone pagata kun malpli da laboro, sed kie li ne havas la plej etan esperon iam interesiĝi pri la entrepreno, do li rifuzas oferi sian estontecon por hodiaŭ.

Kun la allogo de la estonta antaŭeniro de ĉiu dungito, la hispana komerco en Ameriko atingas la perfektan identigon de la ĉefo kaj la dependantoj, kio permesas al ĝi kuraĝe alfronti la konkurencon de aliaj komercistoj kaj malbonajn tempojn. Ĝi estas komerco, kiu ne havas pro-

pran komencan kapitalon kaj funkciajn kredite, tamen ĝi prosperas kaj disvastiĝas, eĉ konkurante kun tiu de la ĉinoj, kiuj vivas per nenio, kaj kun tiu de la sirianoj, posteuloj de la fenicoj de Sidono kaj Tiro kaj same lertaj pri komercado. Ĉe la Nutraĵvendejo en Bonaero, mi devis demandi ĉu la hispanoj prosperas en la podetala nutraĵvendejo, kio estas tio, kion oni nomas *almacenes* en Argentino, kaj mi surpriziĝis konstati, ke antaŭ kvindek jaroj la italoj dominis la komercon en la ĉefurbo, sed ke ili devis cedi al la hispanoj. Fakte, la italoj ne kapablis identigi la interesojn de la ĉefoj kun tiuj de la dungitoj, ĉar ili ne sukcesas senigi sin de siaj entreprenoj por la profito de siaj dungitoj tiel facile kiel la hispanoj, sed emas teni ilin ĝis la lasta minuto, kaj poste estas iliaj infanoj, kiuj heredas ilin.

En malgrandaj hispanaj entreprenoj, la ĉefo vivas kun ties dungitoj en rilato de intimeco, kiu ne malhelpas ilin skrupule konservi la respekton ŝuldatan al ĥierarkio kaj aĝo. En malbonaj tempoj, elspezoj malpliiĝas kaj malpliiĝas. En la kuba kamparo, la lernejestro kaj liaj dungitoj kutime metas siajn litojn sur la vendotablon kaj loĝas en la vendejo. Ili manĝas kune, kaj ĉiuj laboras kune. dek ok horojn tage, tutjare, inkluzive de dimanĉoj,

ĉar la muelado kutime ne haltas ĉe la muelejoj eĉ dum ferioj, kaj ili apenaŭ havas la ŝancon viziti la urbon unu aŭ du fojojn jare. Tial, kiam la usonanoj eniris Kubon post la milito de 1898 kaj provis malfermi ĉiuspecajn establojn, ili rapide retiriĝis fronte al la konkurenco de la hispana komerco, kiu kontentiĝis pri pli malaltaj profitoj kaj pli bone konis siajn klientojn, permesante al ili nei aŭ doni al ili krediton. Fakte, la usonanoj alfrontis spiritan principon pli altan ol sia propra. Ili konfidis ĉion al pli granda kapitalo kaj la ebleco pagi siajn dependantojn per pli altaj salajroj. La hispana komerco, aliflanke, baziĝis sur principoj de solidareco kaj justeco kaj la virto de espero.

## La Aktuala Krizo

**E**stas vere, ke familiaj konsideroj povas kontraŭi la sistemon de limigitaj partnerecoj en la hispana komerco, kiu kreis multajn malamikojn en la amerikaj landoj. Hispanoj kredas, ke estas juste, ke la vendejo estu transdonita al la vendisto, kiu plej interesiĝis pri ĝia prospero, kio povas damaĝi la infanojn de la ĉefo. En multaj kazoj, tia damaĝo ne estas sentita, ĉar ĉi tiuj infanoj emas

preferi liberalajn karierojn al komerco, kaj malmultaj gepatroj pretas igi siajn infanojn suferi la laboron kaj malfacilaĵojn, kiujn la malaltnivela butikista profesio implicas. Aliflanke, oni devas konsideri, ke la vendistoj ne oferus tiom da jaroj por la vendejo, eble povante gajni pli bonajn salajrojn en alia okupo, se ne estus pro tio, ke ili ne estu fraŭditaj de siaj espero iam fariĝi kvalifikitaj kaj industriaj partneroj. Ĉiukaze, la fiero de hispanaj komercistoj en Ameriko kuŝas en faciligado de la antaŭenigo de siaj iamaj vendistoj, kaj inter hispanaj komunumoj, tiu, kiu provizis la plej grandan nombron da vendistoj per la rimedoj por establi sin mem, estas plej fama. Ekzistas kazoj de viroj, kiuj, transirinte de podetala komerco al pogranda komerco kaj travivinte prosperajn tempojn, sukcesis dungi dudek aŭ eĉ tridek longdaŭrajn dungitojn, kaj ĉi tiuj nobeloj ĝuas aŭron en niaj komunumoj, kiun niaj nobeloj en Hispanio envius.

Iel kompreneblas, ke kreolaj registaroj celas malhelpi ĉi tiun disvolviĝon de la hispana

komerco per ĉiaj rimedoj, kiel ekzemple fermi butikojn dimanĉe, trudi ripozhorojn por dungitoj, kaj eĉ devigi dungantojn dungi lokajn dungitojn, almenaŭ en certa proporcio. Ekzistas landoj en Ameriko, kie malriĉeco solvis la problemon, ĉar la gvidantoj estas devigitaj dungi siajn infanojn en la vendejo preskaŭ ekde infanaĝo, tiel ke la entreprenoj nature iras en iliajn manojn. La problemo ekestas nur kie prospero sufiĉas por ŝpari al la infanoj la plej malfacilan laboron, kaj estus maljuste senigi la dungiton, kiu portas la ŝarĝon, de sia rekompenco. La antikvaj gildoj kutime solvis ĉi tiun aferon per jaroj da metilernado, dum kiuj la filo de la majstro iris al la terkultivado kaj lerni la metion sub la disciplino de aliaj majstroj; jaroj da aventuro kaj amo, la *Wanderjahre* ankoraŭ kantata de germanaj poetoj. Eblas, ke la tuta hispana Ameriko tiel malriĉigos, ke la demando malaperos. Sed tio ne signifos, ke la principo, kiu inspiras niajn komercistojn, perdos sian validecon. Malriĉaj animoj donas sian plej grandan penon por tuja kuraĝigo, sed pli altaj animoj preferas oferi la nunon por la estonteco. Ĉiuj institucioj estu organizataj tiel, ke la plej altaj dignoj respondas al la plej persistaj oferoj, por ke ĉiuj homoj

povu atendi, ke, se ili klopodos atingi ĝin, honorinda kaj respektata maljuneco atendos ilin kiel rekompencan pro iliaj laboroj. Kaj ne estas malgranda miro, ke en la 20-a jarcento, la centra principo de la hispanida heredaĵo — fido al la homo, la konfido, ke li povas esti savata, se li klopodas kun energio kaj persistemo — estas tiel sukcesa inter la prozaika ekonomiko de la usona komerco, kiel ĝi estis inter la seriozaj teologoj de la Koncilio de Trento.

## La Du Amerikoj

André Siegfried, en sia verko pri *La Unuiĝintaj Ŝtatoj de Hodiaŭ*, resumis la klopodojn de la granda Usona Respubliko dum la postmilita periodo, difinante ilin kiel *la aktivan reagon de la Malnova Usona elemento kontraŭ la insida konkero de la elemento de fremda sango*. La usona popolo sentas sin interne endanĝerigita kaj *serĉas sian sanon serĉante forton el la fontoj mem de sia vikleco*. Fizike minacataj — ĉar statistikoj diras al ili, ke la malnova anglosaksa elemento ne nur malpliigas relative al aliaj, sed ankaŭ absolute, pro la granda proporcio de tiuj, kiuj ne edziĝas, plus 13 procentoj de sterilaj geedziĝoj kaj 18 procentoj, kiuj havas ne pli ol unu infanon — ĝis antaŭ nelonge ili povis konsoli sin per la espero

asimili la enmigrintajn homamasojn al siaj ideoj. Tiu espero malaperis. Usonanoj konkludis, ke ili povas enstampi sian vivmanieron nur inter la nordiaj eŭropanoj de la protestanta religio: angloj, skotoj, skandinavoj, nederlandanoj kaj germanoj. Kaj ĉar la katolikaj nordianoj, irlandanoj aŭ kanadanoj, la mediteraneaj eŭropanoj, la hispanoj kaj latinamerikanoj, la slavoj kaj la judoj rifuzas asimiliĝi, la nordamerikanoj, per la novaj enmigradaj leĝoj, fermis ilian aliron al sia lando, malgraŭ la fakto ke, jam komence de la 16-a jarcento, Patro Vitoria konsideris ĝin atako kontraŭ la juro de nacioj malpermesi al ili asimiliĝon. Fremduloj vojaĝas tra teritorio aŭ loĝas ĝin konstante.


La Malnova Usonano estas kontenta pri si mem; li estis, almenaŭ, antaŭ la krizo, kiu komenciĝis en oktobro 1929<sup>a</sup>. Li kredas sin memfida pri sukceso, venko, libereco, sia politika saĝo kaj sia industria kapablo. Li estas konvinkita, ke la plej bona afero, kiu povas okazi al enmigrintaj popoloj, estas lasi sin esti gvidataj de la antikva puritana elemento de Ameriko. Tial li iam kredis, ke per reĝimo de libereco kaj egaleco, ili estus senpene asimilitaj. Sed ĉar tio ne estas la kazo, necesas konservi je ĉia kosto *la preskaŭ senlimajn rajtojn de la socia korpo, en ĝia defendo*

*kontraŭ fremdaj elementoj aŭ la fermentoj de dissolvo, kiuj minacas ĝian integrecon.* La Nordamerikano ne volas rasmiksiĝon. Danke al sia politiko de malestimo kaj ekskludo rilate al nigruloj, li fanfaronas, ke lia patrujo ne fariĝos *dua Brazilo* en la estonteco. La idealo estus, ke *la Puritano de angla tradicio, kontenta kaj memfida pri sia bonega rilato kun Dio* triumfu eterne. Tio ne diras ion novan al informitaj legantoj, sed la francaj gazetoj, vidante ke la usona armeo preferis establi siajn bazojn en Saint-Nazaire kaj Bordeaux dum la milito anstataŭ en la havenoj de la Maniko, kie la angloj havis siajn, imagis, ke la angloj kaj usonanoj abomenas unu la alian. S-ro Siegfried pravas atentigi, ke en Usono ekzistas neskribita tradicio, laŭ kiu *angloskota deveno estas preskaŭ necesa por okupi altan oficon; aristokrataro en Nordameriko estas angloskota deveno, kaj la kialo, kial Usono eniris la militon estis konservi anglosaksan hegemonion, komunan al la angloj kaj usonanoj*, kvankam s-ro Siegfried povus aldoni, ke la angloj kaj usonanoj batalas unu kontraŭ la alia dum pli ol unu jarcento.

Jen la vera rilato inter Usono kaj Anglio: reciproka rivaleco kaj profunda solidareco, en tempoj de danĝero, fronte al la resto de la mondo. Kaj ĉu ĉi tio ne estas admirinda rilato, kiu

devus servi kiel ekzemplo al la popoloj de Latinameriko kaj Hispanio? Krom ke ĉi tio estas evidente modelo, kiun ni ne povas imiti. Nek hispanoj nek latinamerikanoj kredas sin superaj al aliaj popoloj, nek ni iam kredis tion, eĉ ne kiam ni estis certaj, ke ni batalas *batalojn de Dio*, ĉar estas unu afero kredi je la plejboneco de nia afero kaj tute alia esti fiera pri sia propra plejboneco. Ni neniam pensis, ke Dio venis en la mondon nur por ni, sed ni batalis ĝuste por la kredo, tiel malnova kiel la Eklezio, sed forgesita, ignorata aŭ neita de sektoj, ke Dio intencis, ke ĉiuj homoj estu savataj. Kaj kvankam ni hispanoj kaj ĉiuj hispanaj popoloj ankaŭ sciis fieri esti ĉampionoj kaj defendantoj de katolikismo, ni neniam imagis, ke ni estis, *tiel diri*, kiel skribas Menéndez y Pelayo en

sia studo pri Calderón, *la popolo elektita de Dio, vokita de Li esti Liaj brako kaj glavo, kiel estis la popolo de la judoj*. Prefere, ni preferis pensi, ke estis ni, kiuj, laŭ propra iniciato, elektis defendi la aferon de Dio. En la unua kazo, se ni sentus nin la elektita popolo, la sama rivaleco kaj solidareco regus inter la hispanaj popoloj kiel inter la anglosaksoj: rivaleco, por montri ke ĉiu el ni estis la plej elektita inter la elektitoj, kaj solidareco, fronte al la tumulto de la aliaj malpli favoritaj popoloj. Sed kion ni sentis ne estis la supereco de elektitaj estaĵoj, sed prefere tiu de la afero, kiun ni ampleksis, kaj estis logike, ke kiam ni seniluziiĝis, aŭ malvarmiĝis, aŭ laciĝis pri la komuna entrepreno, ĉiu el niaj popoloj irus siajn apartajn vojojn.



## Defendo de Hispaneco

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj

---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels137.pdf>

---

Numero 137<sup>a</sup> Oktobron de 2025<sup>a</sup>



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88